


RÜBEZAHL

ESPERANTO
JUNULA
BIBLIOTEKO
N-RO 3



RJR

MITOJ KAJ FABELOJ PRI RÜBEZ AHL

MONTSPIRITO
DE LA SILEZIA GIGANT-MONTARO



El la Rübezah-mitaro
de Max Klose
en Esperanto postrakontita
de Paul Bröther

1933

HEROLDÓ DE ESPERANTO * KÖLN * GERMANUJO

La nomon Rŭbezahŭ elparolu „Rŭbecal“.
(Rŭbezahŭ = betnombranto)

Ĉiuj rajtoj rezervitaj

Preso: Heroldo de Esperanto, Köln, Germanujo

Kiamaniere Rübezahl ricevis sian nomon

Jam de pratempe la Gigant-montaro estas sub regado de montspirito. Multajn jarcentojn ĉi tiu vivis en paco kaj harmonio kun la homoj. Sed de kiam li sentis sin trompita de sia amatino, kaj mokita de aliaj homoj, li ofte incitetis migrantojn, kiuj transmigris la montaron. Ĉefe li punis tiujn homojn, kiuj vokis „Rübezahl“ (betnombranto) aŭ „Rübenschwanz“ (betvosto). Li ĉiam koleriĝis kaj furiozis per kirlvento, neĝo, pluvo, fulmoj kaj tondroj.

Iam li forkondukis belan princinon kaj malliberigis ŝin en sia kastelo en la montaro. Tie la fraŭlino timis, ĉar ŝi estis tute sola. La montspirito penis gajigi la ĉarmulinon, sed sensukcese. Li sorĉis por ŝi beligan kastelon, belan parkon kun maloftaj floroj kaj arbetaĵoj, en kies branĉoj kantis sennombraj birdoj. La princino miregis pri tiu beleco kaj pompo, sed ŝia koro sopiris pli kaj pli al la gepatroj kaj fianĉo. La montspirito, kiu ŝanĝiĝis en belan junan princon, trovis ŝin iun tagon tute malgaja en jasmenlaubo. Li volis ŝin konsoli, sed ŝi rifuzis.

„Iru, lasu min morti en mia soleco, ĉar sen miaj amikinoj la vivo ne plu plaĉas al mi, kaj mi sentas, ke la sopiro al miaj amikinoj mortigos min.“

La montspirito skuis la kapon, kaj forra-

pidis en la ĝardenon. Li baldaŭ revenis kaj metis 13 betojn antaŭ la piedojn de sia amatino.

„Vi ne devas morti, amatino! Prenu tiun bastoneton, tuŝu per ĝi la betojn, kaj vi viduos antaŭ vi viajn amikinojn!“

La princino agis laŭ tiu ordono kaj povis baldaŭ ĉirkaŭbraki siajn amikinojn.

El 13 betoj la montspirito sorĉis 13 paĝojn kaj el 13 aliaj — 13 ĉambristinojn.

La princino nun estis gaja, ŝercis kaj ludis kun la amikinoj. La montspirito staris nevideble apude kaj miris pri la belulino. Si an regnon, siajn koboldojn kaj ĉion li nun donacus al ŝi pro ŝia amo. Sed ŝi ne sentis mankon, se ankaŭ la princo ne ĉeestis. Kun teruro ŝi rimarkis, ke la amikinoj de horo al horo pli maljuniĝis kaj malŝvelis kiel klinitaj patrinetoj. La fraŭlino kolere diris tion al la montspirito. Tiu senkulpigis sin, ke fari pli ne estas en lia potenco: La knabinoj restas junaj nur tiel longe, kiel longe suko estas en la betoj.

„Mi volas alporti freŝajn betojn, kaj lasos la sorĉbastoneton en viaj manoj. Vi povos do ĉiumomente elsorĉi ĉiajn figurojn.“

La princino pripensis, ĉu ŝi ne povus liberigi sin per helpo de la sorĉbastoneto. Ŝi sorĉis el beto abelon, por ke ĝi alportu al ŝia fianĉo komunikon pri ŝia restado. La abelo estis manĝata de hirundo. Fringo, kiun ŝi poste sorĉis, estis manĝata de falko.

Sed pigo reflugis al la princino kun la sciigo, ke la amato atendas ŝin post tri tagoj ĉe la limo de la posedanto de Kynast*).

Nun la princino uzis novan ruzon; ŝi estis ĝoja kaj afabla al la montspirito kaj diris al li, ke ŝi fariĝos lia edzino, sed li iru en la ĝardenon, por nombri la betojn, kiujn ŝi volas ŝanĝi en la geedzo-sekvantaron.

„Sed se vi erarnombros je nur unu beto, mi reprenos mian jes-vorton. Mi estas tre superstiĉa kaj pensus, ke ni ne feliĉiĝus.“

La montspirito ĝoje rapidis en la ĝardenon, dissemis amason da betosemoj, por ricevi grandnombran sekvantaron. Por ke ili rapide kresku, li ordonis al cent koboldoj ekbruligi grandan subteran fajron. La betoj dum malmultaj horoj grandiĝis. Li nun surgenuis kaj komencis nombri. Oftfoje li nombris jam duonon de la kampo, sed forgesis la nombron dum ampensado kaj devis denove eknombri.

La princino ridis pri tio, prenis la sorĉbastoneton, ŝanĝis plej grandan beton en ĉevalon, kaj forrapidegis el la regno de la montspirito. Ĉe la limo atendis ŝin ŝia fianĉo, kiu kun ŝi rajdis al la kastelo de ŝiaj gepatroj.

La montspirito, finnombrinte la betojn, ĝoje revenis al la kastelo, sed trovis ŝin

*) Kynast, nun nur ruino, estas kastelo sur monto.

nenie. Tuj li enaeriĝis kaj povis ankoraŭ vidi la malfidelulinon en la brakoj de ŝia fianĉo. Li postĵetis multajn fulmojn, kiuj ne trafis ŝin, sed frakasis multajn arbojn.

De tiu tempo la montspirito malamas la fraŭlinojn kaj ĝojas, se maljuna fraŭlo insultas la virinojn. Tia grizbarbulo foje sciigis al li, sentime, ke la princino plu rakontis la okazaĵon pri la betnombrado kaj ke la homoj de tiu tempo lin nomas Rübezahl. Nun koleriĝis la montspirito kaj ĵuris puni ĉiun, kiu elparolos tiun nomon. Li ruinigis per uragano kaj fulmoj la kastelon kaj ĝardenon, kie estis la princino. La homoj ankoraŭ hodiaŭ nomas la lokojn Rübezahlparko kaj Rübezahl-kastelo.

Rübezahl kaj la banul-societo

Antaŭ ducent jaroj sidis iam ses sinjoroj kaj ses sinjorinoj en la „Probstei“-banejo*) de la banloko Warmbrunn. La fraŭlinoj kantis kaj la sinjoroj mokis pri la dikaj sinjorinoj. Bakista majstro el Berlino asertis, ke oni devas sidi senmove; se ne, la banado neniel helpas. Tial li komencis rakonti Rübezahl-mitojn. Bela fraŭlino avertis la dik-

*) „Probstei“-banejo = termofonto, nun malkonstruita kaj anstataŭigita per pli moderna bandomo.

an panistmajstron, ne daŭre elparoli la moknomen de la montspirito.

„Li faros al vi mokaĵon, kiel li jam faris al multaj homoj, kiuj moke parolis pri li.“

La bonhumora Berlinano kaj la banul-societo ridis pri la averto, opiniante, ke Rübzahl nur faras petolaĵojn en la montaro, sed ke en la valo li ne havas potencon super la homoj. La dika Berlinano tute ne kredis al la montspirito.

„Se ekzistus tia monstro, li elirigus nin nigraj kiel negroj el la bano“, li diris.

La gesinjoroj ridis pri tiu ideo kaj opiniis, ke estus pli bone, se Rübzahl ŝanĝus iliajn ĉemizojn en arĝenton.

Dum tia babilado pasis la tempo, kaj la panistmajstro iris la unua el la bano. Li klinis sin, sed la societo ektimis pro li, ĉar li estis nigra kiel negro. La teruro ankoraŭ pligrandiĝis, kiam la banantoj rigardis unu la alian, — ĉiuj havis nigran haŭtkoloron. Nur la bela ĝentila fraŭlino, kiu avertis la Berlinanon, restis blankhaŭta. Ŝia banĉemizo ŝanĝiĝis en puran arĝenton.

La banul-societo rapide vestis sin kaj kuris hejmen. Nun la sinjorinoj kuŝis plorante kaj la sinjoroj malbenante en la neĝ-blankaj litoj kaj ne sciis helpi sin. Kiam ili tagmeze ellitiĝis, ili vidis kontente, ke ilia haŭtkoloro ree fariĝis blanka.

La arĝenta ĉemizo de la ĉarma fraŭlino

ne tolajiĝis kaj restis pura metalo. Nobla sinjoro fariĝis ŝia fianĉo.

La reblankiĝintaj nigruloj neniam plu vokis la montspiriton per lia moknomo.

Rübezahl, vitristo kaj muelisto

Iam, dum somero vitristo iris trans la „Gigant“-montaron. Sur la dorso li portis en portilo boheman vitron, kiu estis tre peza.

Rübezahl vidis la lacan migranton serĉi sidlokon. Tuj li kaŭris kaj ŝanĝiĝis en ŝtonon. La vitristo tuj eksidis sur ĝi. Sed la ŝtono subite malaperis en la tero, la vitristo falis sur sian dorson, kaj ĉirkaŭ li la vitropecoj.

La malriĉa viro nun eklamentadis, ĉar li perdis sian lastan monon per la disrompita vitro. Kiam Rübezahl vidis, kian mizeron li faris, li kompatis lin. Li aperis antaŭ la lamentanto kiel kamparano kaj diris, ke li volas trioble kompensi lian perdon. Li estas la montspirito kaj bezonas simplaniman homon por puni la friponegan mueliston en la proksima vilaĝo. Tiu vendas por bonaj greneroj malbonan farunon kaj por multe da mono malpezan panon al malriĉuloj. Li ordonis al la vitristo plenigi la dorsan portilon per silikŝtonoj kaj sidiĝi sur lian dorson. Tion faris la vitristo, kaj subite li sidis sur azeno, kiu laŭte ridblekis.

„Ne timu, vitristeto! Mi portos vin bone al la valmuelejo, tie vi vendos min al la muelisto por 20 guldenoj. Vi enpoŝigu la monon kaj iru hejmen!“

La rajdado sur la beleta azeno tre plaĉis al la vitristo. La muelisto staris en la pordo, kiam la vitristo alrajdis. Li reŝovis sian pintan ĉapon sur la dekstran orelon, rigardis kiel fakulo al la azeno kaj faris signon per la mano.

„He, kiom kosta estas la azeno? Mi volas anstataŭigi muelazenon.“

„Kion? Por porti sakojn mia „Hansel“ estas tro malforta. Por rajdi mi volas vendi ĝin al vi, vin kaj vian pintan ĉapon ĝi ja portos.“

15 guldenojn kaj aĉettrinkon proponis la muelisto por la besto. La vitristo volis ricevi pli multe, sed ili fine interkonsentis. Li prenis la monon kaj foriris.

La muelisto transdonis la azenon al servisto.

La servisto kondukis ĝin en la stalon kaj ĵetis malbonodoran fojnon antaŭ ĝin. La azeno flaretis je ĝi kaj skuis sin.

„Forprenu nur tion, mi ne manĝas fojnon, sed nur rostaĵon aŭ kukon.“

Ĝis nun la servisto ne aŭdis paroli veran azenon; tiom pli granda do estis lia teruro. Li kuris rapide al la majstro por raporti pri la okazintaĵo. La muelisto ĝoje buligis en la manoj sian pintan ĉapon.

„Tia azeno, kia estas vi, songas kaj parolas malsaĝaĵon, sed vera grizulo neniam.“

La servisto ne volis refoje iri sola en la stalon. Nun mallaŭdis la majstro kaj iris mem en la stalon. Sed kiam ekvidis lin la azeno, ĝi kapjesis kaj diris:

„Ŝajnas al vi strange ke mi scias paroli, sed estas tiel. Mi vizitis la altlernejon en Prago kaj lernis tie trinki vinon kaj manĝi rostaĵojn aŭ kukojn. Ankaŭ sur pajlo mi ne dormas, sed sur kusenego.“

Unue la muelisto ne povis paroli pro mir-ego, sed baldaŭ superregis lia avaro.

„Tiukaze mi ne povas utiligi vin, ĉar ĉe tia manĝaĵo eĉ mia infano ne utilis al mi. La vitristo trompis min, kaj mi volas redoni vin al li.“

Li surmetis la selon kaj postrajdis la vitriston. Survoje li batis sen kompato sur la azenon kaj pinĉis ĝin kolerege per la gamboj. Sed la grizulo baldaŭ kriis laŭte:

„Vi estas best- kaj homĉikananto, kiu nun ricevos sian punon. La homojn vi trompas per malbona faruno kaj malpeza pano kaj la bestojn vi turmentas sen kompato.“

Sagrapide galopis nun la parolanta azeno mont-malsupren kaj direkte al lageto. La muelisto antaŭvidis sian certan morton, petis kaj malbenis. Kun la rajdanto firmkreskinta sur sia dorso, la azeno sovaĝe saltis en la lageton. La muelisto kriis denove, petis plorante kaj promesis, nek trompi la hom-

ojn nek turmenti plu la bestojn dum sia vivo. Sankte li ĵuris plenumon de sia promeso. Kiam li ĵuris, li sidis subite sur pak-aĵo da telo; la azeno malaperis. Li dankis al Dio pro sia savo. En la tolaĵo li trovis sian menon kaj bonajn konsilojn por sia vivo. Li plenumis siajn vortojn kaj fariĝis ŝatata viro.

La malriĉa vitristo venis feliĉe hejmen kaj trovis en sia dorsa portilo milojn da oraj moneroj, ĉar la silikŝtonoj de Rübezahl fariĝis pura oro.

La surmontara gastejestro

Foje Rübezahl loĝis en surmontara gastejo (baŭdo) por inciteti fremdan societon, kiu iun tagon eniris kaj postulis manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj tranokteblecon. Rübezahl klinis sin multfoje antaŭ la fremduloj kaj certigis, ke li povas servi ilin plej bone. Inter la societanoj estis gastejestro el grandurbo, kiu ĉagrenis la surmontaran gastejestron. Li mallaŭdis la manĝaĵojn kaj trinkaĵojn kaj insultis pri la malbonaj ĉambroj kaj pri la malrapida servado.

Rübezahl senkulpigis sin ĝentile kaj rimarkigis, ke li certe estus tuj malferminta la luksajn ĉambrojn, se li estus sciinta ke la sinjoro estas duko. La vojaĝantoj ridis pri

tio kaj vidis, ke la gastejestro ekkonis la gaston. Sed tiu insultis plu kaj volis vidi la bonajn ĉambrojn.

Rübezahl frapis kontraŭ muro, pordo malfermiĝis kaj pompa salonego videbliĝis, en kies mezo staris longa manĝotablo kun arĝentaj kaj oraj pladoj. Tie sidiĝis la societo, kaj la montspirito frapis denove kontraŭ la muro. El nova pordo venis 13 paĝioj en belegaj vestoj kaj alportis en oraj pokaloj la plej bonan vinon. Rübezahl montris dukan pompon, sed la fremda gastejestro diris tamen, ke li posedas hejme ĉion en pli bela speco. Alia gasto debatadis kun li pri tio kaj la fremda gastejestro fine diris, ke al la plej malbona gastejestro kresku virbovaj kornoj. Apenaŭ li diris tion, kiam kreskis el lia kapo kornoj, kaj la kapo ŝanĝiĝis en bovkapon. Laŭte li blekadis, sed neniu komprenis lin.

La societo malenviis pri tio la stultan fanfaronulon kaj festis sen interrompo. La edzino de la virbovkapulo diris nun malbenajn moknomojn al Rübezahl. Baldaŭ kreskis ankaŭ el ŝia kapo kornoj, kaj ili similis unu al la alia. Nun ne finiĝis la blekado de la punatoj kaj la ridado de la aliaj gasto, ĝis ĉiuj ebrie endormiĝis. Je la alia mateno la surmontara gastejo estis malaperinta, la gastejoj kuŝis en malsekaj herboj kaj la kapoj de la impertinentaj geedzoj estis reŝanĝiĝintaj en sian antaŭan formon. La societo

kuŝis sur herbejo, kvazaŭ ĝi estus falinta ebria kaj ŝajnis al ĉiuj, ke ili nur songis.

Rübezahl kaj la barbiro

Kiel vera ŝtelĉasisto kun hirta barbo kaj malorda hararo Rübezahl foje venis en frizejon. La frizisto kaj la ĉeestantaj gastoj ridis pri tiu terurulo.

Neinvitite Rübezahl sidiĝis en apogseĝo. „He, majstro, ĉu vi riskus ordigi mian hararon kaj mian barbon? Vi ne pentos tion.“

La barbiro ne montris grandan emon por tiu laboro, sed la ebleco gajni bonan pagon emigis lin. „Granda arto vere estas necesa por tio, sed ĝuste tial mi faros ĝin; miaj klientoj devas vidi, kion mi kapablas fari.“

Rübezahl metis kvin guldenojn sur la spegultablon, kaj la tondado komenciĝis. Sed ĝi ne estis facila. Unu tondilo post la alia malakriĝis kaj la barbiro ŝvitegis. Fine la haroj estis tenditaj kaj ordigitaj. Sed la barbiro ne volis ordigi la barbon.

„Enpoŝigu nur vian monon kaj igu razi vian barbon aliloke!“

Sed Rübezahl duobligis sian pagon por kuraĝigi la barbiron. „Dek guldenoj estas tro multe! Por tio oni povus ankoraŭfoje ĝin riski.“

Ree ŝvitegis la viro kaj tranĉilo post tranĉilo malakriĝis. Fine estis finita ankaŭ

tiu laboro; Rübezahl ekstaris, premis la manon de la barbiro kaj foriris kiel modernulo el la ĉambro.

La majstro postrigardis lin kaj viŝis de sia frunto la ŝviton. „Mi nek vidis nek tondis dum mia ĝisnuna vivo tian kapon . . .“

Li prenis tufon da hirta hararo for de la ĉambroplanko por ĵeti ĝin en la fornon. Sed mirege li vidis, ke la haroj ŝanĝiĝis en puran oron. Nun rimarkis la ruza barbiro, ke Rübezahl estis la sovaĝiĝinta gasto. Li kolektis la orajn harojn kaj nomis sin de nun: »Kortega frizisto de Rübezahl«.

Rübezahl, kamparano kaj gastejestro

Malriĉa kamparano el montara vilaĝo iam veturis valen, por vendi veturilsarĝon da faga ligno. Kiam li en urba gastejo maljungis la ĉevalojn, la ligno plaĉis al la gastejestro. Li starigis sin apud la kamparano ĉe la bierverŝejo, donis al li botelon da brando kaj diris amike, frapante liajn ŝultr-ojn: „Mi aĉetos vian lignon. Vi tiam ne bezonos per demandoj serĉi aĉetanton en la urbo.“

La kamparano konsentis, ĉar hejme edzino kaj infano atendis monon por aĉeti vintrajn vestaĵojn. La kamparano trinkis sian brandon, kaj daŭris ne longe ĝis la botelo estis malplena.

„Ni parolos baldaŭ pri la prezo, sed vi devas ankoraŭ atendi duonan horon, ĝis mia edzino venos hejmen.“ Intertempe la brando ebrigis la kamparanon, li iris inter la aliajn gastojn kaj insultis ilin.

Tion atendis la gastejestro kaj elirigis lin el la gastejo. La domservisto demetis intertempe la lignon, sed monon ne ricevis la kamparano. Fordorminte sian ebriecon, li deziris pagon. La gastejestro ŝajnigis sin tute nenion scianta; poste li kriis:

„Mi tuj pagis vian lignon ĝis la lasta fenigo. Ĉu estas mia kulpo, ke vi lasis ŝteli vian monon dum via ebrieco? Mi eĉ ne kalkulis la brandon, kiun vi trinkis; pro tio mi nun prenos vian ĉevalkovraĵon kiel garantion, ĝis vi pagos.“

La kompatindulo devis sen mono veturi hejmen. Kiam li veturis tra montar-arbaro, li laŭte ekploris. Gaja ĉasisto vidis tion, haltigis la veturilon kaj demandis pri la kaŭzo de lia malĝojo. La kamparano rakontis la friponaĵon de la gastejestro. La ĉasisto diris: „Mi volas puni la gastejestron kaj kompensi vian perdon; ĉar mi estas la montspirito, kiu povas fari oron el radikoj.“

Li donis al la kamparano radikon, kiun tiu enpoŝigis. Hejme li efektive trovis aron da oraj moneroj en la poŝo.

Rübezahj iris la sekvantan matenon al la gastejestro.

„Mi estas diligenta laboristo“, li diris, „kaj aŭdis, ke vi havas klaŭton da ligno por haki. Vi povus min dungi por fari tion, mi bezonas panon por miaj infanoj.“

La gastejestro jesis: „La laboron vi povas fari, sed monon mi ne povas doni al vi; estas tro mizera tempo. Sed vi povos preni tion da ligno, kiom vi povos porti, kaj povos satmanĝi.“

La laboristo kapjesis malrapide: „Kelkajn krejcerojn mi ja preferus. Sed se vi volas doni al mi nur lignon kaj manĝaĵon, mi devas esti kontenta.“

La gastejestro montris nun la lignon al Rübzahl kaj tiu ĉi tiris hakilon el sia zono kaj malgrandhakis la tutan lignon dum malmultaj momentoj.

La gastejestro miris pri tia rapida laboro kaj donis al li malgrandan teleron da manĝaĵo. Rübzahl skuis la kapon. „Tiel ni ne interkonsentis, majstro! Mi volas satmanĝi, kaj por tio mi bezonas pli multon.“

La gastejestro respondis, ke li neniam donas pli grandajn porciojn al siaj laboristoj kaj diris: „Kompensu vin nur per faga ligno.“

Rübzahl ne dufoje dirigis tion al si. Li iris en la korton kaj ŝargis la hakitan klaŭton da ligno ĝis la lasta ŝtipeto sur sian dorson. Poste li starigis sin antaŭ la gastejestro kaj ridadis tion, ke la fripena homo tion sentis ĝis en la interno de sia animo.

„Tiel mi kompensas min kaj la kampar-
anon, kiun vi trompis!“

La gastejestro tremis tutkorpe kaj nenium
plu trompis estonte. La kamparano retrovis
alimatene sian lignon en sia arbaro.

La diamantpiloloj

Malriĉa virino estis grave malsana je fe-
bro jam de multaj jaroj. Nenie ŝi trovis hel-
pon. Fine oni konsilis al ŝi por resaniĝo ra-
dikon, kiu kreskas en la arbaro de la alt-
montaro. Pene grimpis la malsanulino en la
montaron por serĉi la radikon. Kiam ŝi sid-
iĝis sur arbostumpo por ripozi iomete, al-
venis maljuna sinjoro, kaj demandis pri la
celo de ŝia promeno. Li ridis pri la radik-
rakonto kaj diris: „Kontraŭ la febro mi
scias pli bonan medikamenton. Jen, prenu
kelkajn pilolojn kaj konservu la aliajn bone,
ili valoras kapitalon.“

La malriĉa virino kore dankis kaj volis
sin faligi antaŭ la piedojn de la sinjoro. Sed
li ne permesis tion kaj diris, ke li estas ku-
racisto el Warmbrunn, kaj estonte ree de-
mandos pri ŝia farto.

La virino tuj prenis de la piloloj kaj sentis
baldaŭ ties helpon. Malsana ŝi iris en la
montaron, sana ŝi revenis. Kiam ŝi hejme
rigardis la pilolojn, ŝi vidis, ke ili fariĝis
belegaj diamantoj. Por ili ŝi ricevis multe

da mono. Rübezahl, kiu estis la kuracisto, ne nur sanigis sed ankaŭ riĉigis ŝin.

Rübezahl kaj la metiistoj-migrantoj

Du malriĉaj metiistoj-migrantoj migradis foje trans la Gigant-montaron. Ili volis serĉi laboron en la sudo, ĉar post la Husita milito en Silezio la metio stasis malbone. Ĉe granda lago ili ripozis por matenmanĝi. Kvan-kam ili posedis nur malmulte da pano kaj vino, ili tamen donis de ĝi al alia migranto, kiu samtempe malsata alvenis. La fremdulo demandis, de kie ili venis kaj kien ili volas iri? Kiam li aŭdis ilian intencon, li mal-konsilis kaj diris, ke li estas maljuna migranto kaj spertis, ke en eksterlando oni ankaŭ ne riĉiĝas kaj ofte eĉ pli malriĉa hejmen venas ol oni foriris. La fama proverbo restas eterne vera: „Restu enlande kaj nutru vin brave!“

La migrantoj konsentis tion. Ili diris, ke ili ne intencus iri eksterlanden, se ili ricevus laboron en la hejmloko aŭ se iu pruntedonus al ili monon. Sed kiu helpos ilin?

La fremdulo ĉirpis sur la ŝultron de unu. „Vi estas du bravuloj! La lastan pecon de via pano kaj la lastan guton el via botelo vi partigis kun fremdulo, de kiu vi kredis nen-ion rricevi. Tion faras nur bonaj homoj, kiuj nun estas maloftaj. Mi volas vin rekom-

penci por tio. Ĉiu prenu avel-arbetaĵon kaj plenigu siajn poŝojn per glimoskisto. Mal-supre en la valo donu tion al la plej riĉa komercisto, kiu estas mia amiko kaj helpos vin.“

La migrantoj agis laŭ deziro de la fremdulo kaj kun danko iris valen. Tie ili demandis pri la plej riĉa komercisto, kaj oni nomis al ili la monŝanĝiston. Tuj ili iris al li, diris la saluton de la montara amiko kaj rakontis ĉion.

La komercisto ekridegis. „Tio povas esti nur la montspirito, pri kiu mi jam multon bonan aŭdis kaj diris.“

Malĝoje la migrantoj volis foriri; sed la monŝanĝisto deziris vidi la glimoskiston. Ili ŝutis ĝin sur la pagtablon kaj vidis kun ĝoja mirego, ke la glimo fariĝis pura oro. La komercisto rimarkis ankaŭ, ke la avelarbetaĵoj estas el pura oro. Li aĉetis de ili la flavan metalon kaj pagis laŭ valoro. La migrantoj sciis nun, ke Rŭbezah! estis la fremdulo. Per lia donaco ili riĉiĝis kaj promesis, fariĝi lertaj majstroj.

La bastono de l' sendito

Sendito starigis foje sian bastonon antaŭ pordo de baŭdo. Rŭbezah! havis la strangan ideon sin kaŝi en ĝin. Kiam la sendito plu-iris, li prenis ĝin sen antaŭscio kaj apogis

sin sur ĝi; sed la bastono deglitis. La sendito falis sur la teron. Kiam li ree apogis sin, ĝi ree deglitis. Ĉagrene li nun prenis ĝin sur la ŝultron. Sed la bastono estis tiom peza, ke li ne povis porti ĝin. Pripensinte li uzis ĝin kiel bastonĉevalon, kaj la rajdado sur ĝi estis tre bona. La bastono trapasis mejlon dum malmulte da tempo kaj pli rapide ol vera ĉevalo. La sendito tre ĝojis pri tio kaj ne afliktigis pro la ridado de la preterpasantoj. Sed Rūbezahlon baldaŭ tedis tiu ŝerco. Kiam la sendito hejmen iris, la bastono ne servis plu por rajdado. Ĝi fariĝis ree la malnova bastono.

La testamento de Rūbezahl

Rūbezahl vizitis foje la foiron de Landeshut. Li ŝanĝigis en maljunan kadukan butikiston kaj tranoktis en gastejo kun granda peza kesto, kiu estis multoble fortikigita per fero kaj fermŝlosita per tri pendseruroj.

Tie li malsaniĝis. Ĝemplendante li kuŝis en la lito kaj deziris, ke oni alvenigu la vilaĝbarbiron*). Tiu alvenis, surmetis sian grandan okulvitron, rigardis en la buŝon de la malsanulo, palpis la pulson kaj skuis la kapon.

*) En antaŭaj tempoj vilaĝbarbiro anstataŭis kuraciston.

„Ĉi tiu finiĝos, Becher-gastejestro.“ Pene la malsanulo levis la kapon. „Ĉu vi opiniĝis tion? Nu, mi ne timas la morton, sed antaŭe mi deziras lari mian testamenton. Prenu la ŝlosilojn sub miaj kusenoj kaj malŝlosu la foirkeston.“

Vilaĝbarbiron kaj gegastejestrojn rapidis por plenumi la deziron. La fermoplato de la kesto estis suprentirata. Sed kiel miregis la malfermintojn pri la enhavo, kiu valoris multajn centojn da guldenoj. Oraj pelvoj, pokaloj kaj vazoj, pezaj oraj ĉenoj kaj granda arĝenta barelo kun trembrilaj dukatoj plenis la keston.

La miregantoj preskaŭ ne povis spiri, kaj la gastejestro diris: „Kiu supozis ĉe tiu malriĉ-aspektanto tiajn riĉaĵojn!“

La malsanulo tusetis kaj petis la barbiron skribi la testamenton kaj kun helpo de la gegastejestroj zorgi por ties plenumo. Li diktis malrapide:

„La orajn pelvojn, pokalojn kaj vazojn ricevos la duko Bolko*), la orajn ĉenojn la plej bela fraŭlino de Landeshut kaj la arĝentan barelon la plej brava sinjorino de Grüssau. Mil dukatojn ricevos la vilaĝbarbiron, milion la gastejestro kaj tri milojn la gastejestrino; per cent dukatoj estu pagata

*) La posedanto de Bollkoberg ĉe Bollkenhain.

mia entombigo, kaj la restantajn milojn da dukatoj oni donacu al la malriĉuloj.“

La tri ĉeestantoj ĵuris en la manon de la mortonto, ke ili zorgos por bona efektivigo de la testamento. Nun la malsanulo fermis la okulojn. La vilaĝbarbiro deklaris lin mortinta.

La gastejestro diris: „Neniu scias krom ni pri la riĉaĵoj.“ „Kiel estus“, respondis la vilaĝbarbiro, „se neniu alia ekscius pri ili?“

La alia kapjesis kaj la gastejestrino batis sur la keston: „Neniu, neniu, sinjoro baptopatro, neniu! Ni partigos inter ni la multekostaĵojn.“

Ili fermis la keston, ĉiu ricevis ŝlosilon, la testament-paperon ili ĵetis en la fornon. Ili portis la mortinton en apudan ĉambreton kaj starigis apud li keston kun senvalorajoj.

La gastejestro anoncis al la urbestro, ke ĉe li mortis butikisto, kaj mendis por li malriĉulan entombigon. La ĉerko estis frumatene entombigata. Kiam oni suprentiris la entombig-ŝnurojn, eksonis laŭta ĝemado el la tombo. La entombigisto kaj la ĉerkportantoj forkuregis senkuraĝe. Komisiono kun la vilaĝbarbiro iris al la tombo kaj malfermis la ĉerkon. Sed tiu estis tute malplena.

Neniu povis klarigi tiun enigmon. La barbiro ekspiris kontente, ĉar li timis, ke la

butikisto eble viviĝis aŭ saniĝis. Avara kia li estis li rapidis hejmen kaj al la Becher-gastejestro kaj postulis tujan partigon.

Tiu plenumis la peton, malfermis la keston, sed — kia seniluziigo! Ĉiuj multekostaĵoj estis malaperintaj, nur kelkaj ĉifonoj kuŝis en la kesto. Sur la interna kesta fermlato estis skribite:

»Nenia promeso estis al vi sankta, vi mem rompis vian ĵuron. Pro tio baldaŭ sekvis al la krimo via puno.«